



La Pinakloj, en Okcidenta Aŭstralio



# Esperanto sub la Suda Kruco

Marto-Aprilo 2002

Numero 56 (vol. 10, #2)

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la  
Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj



ISSN 1039-9380

# Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 56 (volumo 10, numero 2), Marto-Aprilo 2002

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org)

## Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo,  
143 Lawson St Redfern, NSW 2016,  
Aŭstralio. E-poŝte:

[libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au)

## Korespondaj kursoj:

Hazel Green, 44 Towoomba Road,  
Oakley Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:

[hazgreen@tmba.design.net.au](mailto:hazgreen@tmba.design.net.au)

## SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis, kiam vi el-  
kovertigis vian novan ekzempleron de  
*Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere  
bezonas artikolon pri ...?” Do sendu  
tiun amatan eseon, ideon, rakonton,  
esprimon de vidpunkto, leteron, deseg-  
naĵon, foton.

Ni preferas ke vi sendu vian kon-  
tribuon per e-poŝto, al la adreso [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org); vi povas ankaŭ  
sendi ĝin sur Zip-disko (100mg aŭ  
250mb), sur komputila disko (Mac aŭ  
Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi  
sendas sur papero, la teksto devas esti  
klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu  
sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun  
ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpit-  
ajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti  
kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de  
ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aper-  
igo. Laŭbezone teksto povas esti mal-  
longigita. Pri la enhavo de artikolo res-  
pondecas nur ĝia aŭtoro.

**La kovrilbildo:** *La Pinakloj*,  
naturaj monolitoj ĉe la marbordo de  
Okcidenta Aŭstralio, populara sed ne  
facile atingebla turistikvidaĵo, ĉ. tri hor-  
ojn norde de Perto.

## EN ĈI TIU NUMERO

### Artikoloj:

La Somerkursaro en Perto 2002.....3	
Raporto de Franciska Toubale ....3	
Kvar paĝoj da fotoj.....4	
Raporto de Jennifer Bishop.....8	
Raporto de la Komitato .....8	
La Premio Fritz Mueller-Soreau .....3	
La nova Oceania Komisiono.....9	
Deziras korespondi.....10	
Nekrologo: Sydney Grant.....10	
Por ridigi vin: Advokataĵoj.....11	
Sukcesis en la ekzamenoj.....13	
Poŝtkartoj de John Bailes (Ralph Harry).....20	
Esperanto — lingvo por ĉiuj — lingvo por ni (Jukka Laaksonen) .....22	
Interrete.....23	
Jakunveno 2002 de AEA.....25	
Mallonge.....28	
Reklamo nepagita, Nia konkurso, El la regionoj.....29	
Odlo Bokserp: Lia paĝo.....30	

### Recenzoj:

<i>La Fotoalbumo</i> (T.Steele).....12	
<i>Baza esperanta radikaro</i> (W. Pilger).....13	
<i>Purgatorio</i> (Dante Alighieri).....13	

### For the Beginner

*Transitive and Intransitive* (pp.14-20)

ESK estas legebla per Interrete:  
<http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por artikoloj por la  
maja numero: 15 aprilo.

# Pri la somerkursaro en Perto

de Franciska Toubale

Ĝus finiĝis plia somerkursaro: la 18a somerkursaro. Kvindeko da homoj partoprenis ĝin. Venis Bradley MacDonald de Nov-Zelando, kaj tri aliaj eksterlandanoj neanglaparolantaj: Franciska Resiel el Eischborn apud Frankfurt en Germanio, Vinh el Hanojo, kaj Atilio Orellana Rojas. Vizitis nin de tempo al tempo Niza Kiuterman, el Nederlando, ankaŭ esperantistino, kiu pasigas la eŭropan vintron en Perto pro sanproblemo.

Ĉiumatene okazis klasoj je kvar niveloj sub la gvidado de Atilio, Penny, Marcel, kaj mi. Ĉiu grupo enhavis inter 10 kaj 15 lernantojn, bona nombro por krei viglan etoson kaj doni al ĉiu oportunon sin esprimi.

Posttagmeze, laŭ sia elekto, la ĉeestantoj preparis sin por la ekzamenoj, kun Marcel; sekvis la seminarion A pri la Cseh-metodo, kun Jenny; diskutis kiel helpi la aliajn lerni Esperanton; aŭ kantis.

Post la vespermanĝo okazis prelegoj, montrado de lumbildoj, ludoj, aŭstralianaj dancoj, ekskursoj, kaj la du konkursoj — pri kantado, kaj pri teatrumado. Mi povas diri ke ĉi-jare ĉiu ŝtato partoprenis ambaŭ konkursojn. La nivelo de la prezentaĵoj iom post iom altiĝas. La kvinslandanoj tenos la Ŝildon Müller dum la jaro 2002 pro siaj amuzaj kantoj; kaj la viktoriaj la Trofeon Herbert Koppel pro sia interpretado de unu el la komedioj de la skota verkisto Robert Mackay: *Amo per floroj*.

Al la sapskatolo mankis iom da vigeleco kaj spriteco, kvankam laŭ nia tradicio ĝi komenciĝis per ŝercaj provokajoj: La morto de kriketo kaj la pli-graviĝo de teniso, de Ralph Harry; la prezentado de la lingvo Zesprimil, de Bradley MacDonald; la tre negativa aspekto de Okcidenta Aŭstralio, de

Marcel Leereveld; kial oni devas turni la kapon por parki aŭtomobilon, de Sandra O'Connor — La fizika kaj morala kuraĝo de ĉiuj meritas laŭdon, ĉu pro timo pri vertiĝo (oni devis stari sur seĝo meze de la perono), ĉu pro la moskitoj. Finfine, laŭ instigo de Shirley Graddussov, la grava temo de la rilato inter krimoj kaj punoj estis diskutita.

La Kolegio mem estas tre agrabla konstruaĵo el ruĝaj brikoj, kies arkitekturo memorigas pri britaj universitatoj, pro la ĝardenoj, la korto, kaj la ĉirkaŭaj kolonoj. La servistaro estis ege afabla kaj helpema, same kiel la pertano ĝenerale. Pro tio ke Perto estas malgranda urbo, la loĝantoj volonte alparolas kaj akompanas vin por helpi.

La vetero ne estis tiom varma kiom antaŭvidite. Mi eĉ fojfoje malvarmis. Eble tio stimulas la menson.

Ne ĉiuj aliĝintaj eksterlandanoj povis veni. La registaro rifuzis doni vizon al du ĉinoj kaj al vjetnamanino. Ilia ĉeesto estus ege grava. Je la fino de la kursaro kelkaj lernantoj el nivelo 2 parolis kun Vinh dum almenaŭ unu kaj duona horoj senĉese. Ili miris ke ili kapablas tion fari, kaj sukcesis eklerni tion multe pri la vivo de Vinh, kvankam je la komenco de la kursaro, antaŭ du semajnoj, ili ne povis kompreni unu la alian. Tiu sperto nepras por senti kio estas Esperanto. Koran dankon al la okcidentaŭstralianoj, pro kies laboro ni pasigis du agrablajn semajnojn.

---

La Premio Fritz Mueller-Soreau estas prezentata de la estaro de la Esperanta Federacio de Nova Sud-Kimrujo al la komencanto kiu montras esceptan kapablon. Ĉijare premiigis *Matthew Maguire*.

## El la Somerlernejo: Fotoj



fotis Alan Mendelawitz

Konferencujo: Kolegio Sankta Georgo, en Perto



fotis Franciska Toubale

Ralph Harry sur la sapskatolo



fotis A. Mendelawitz

Riverokrozboat Lady Sammy J



fotis Franciska Toubale

Gajnintoj de la Ŝildo Müller por kantado:  
Kay, Ana, June, Gaye, Sandra



Nivelo 1 kantas



Atilio Orellana kaj Niza Kurterman



Riverokrozboat Lady Sammy J



Oni plantas la rozarbustojn

fotis Alan Mendelavitz



Fotis Hazel Green

En la urbocentro: Paul kun la kangaruoj



fotis Alan Mendelawritz

Kapelo de Kolegio Sankta Georgo



fotis Alan Mendelawritz

Urbestro Peter Natrass



fotis Hazel green

Owen Loneragan kaj John Massam




fotis Alan Mendelawitz

René Smeets kaj Jenny Bishop



fotis Franciska Toubale

Dum la sapskatolado



fotis Alan Mendelawitz

Bernie Heinze



fotis Alan Mendelawitz

Franciska Toubale kaj Alan Bishop



fotis Alan Mendelawitz

S-ro Forrest, D-ro Vinh, Shirley Graddussov



fotis Alan Mendelawitz

Bahaa ĥoro



fotis Alan Mendelawitz

Peter Natrass kaj Trish O'Connor

## La 18a Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto

raportas Jennifer Bishop

Perto, la plej fora urbo de la mondo, izolita ĉe la okcidenta marbordo de Aŭstralio, bonege gastigis la 18an Aŭstralian Somerkursaron de Esperanto kaj Jarkunvenon de AEA. Ĉeestis proksimume 60 partoprenantoj, inkluzive de D-ro Nguyen Vinh el Hanojo, Vjetnamo, kaj amikinoj germana kaj nederlandana.

La ampleksa programo konsistis el ĉiutaga kurso je kvar niveloj. En ĉiu nivelo estis du profesiaj instruistoj. Instruis Atilio Orellana Rojas, Penny Vos, Franciska Toubale, kaj Marcel Leereveld.

Posttagmeze, krom plia kurso por la komencanta grupo diaspora, proponatis ankaŭ kantado, preparado por ekzamenoj je la baza kaj meza niveloj kaj Cseh-seminario nivelo A.

Aktora kaj Muzika Konkursoj inter la provincoj de Aŭstralio bone distris dum du vesperoj. Eblis ankaŭ ekskursi per ŝipo sur la bela kaj larĝa rivero Swan kaj per tramo tra la freŝa kaj historiplena urbo Fremantle kaj ĝia parko antaŭ ol viziti kaj esti enkarcerigitaj en la malnova fantomoplena malliberejo!

Interalie, oni profitis ankaŭ interesajn paroladojn de Atilio Orellana Rojas pri Indiĝenaj Dialogoj, de Juĝisto Kep Enderby, eks-prezidanto de UEA, pri Oceanio, kaj de D-ro Ralph Harry, iama Aŭstralia ambasadoro ĉe Unuiĝintaj Nacioj, pri la traktado de rifuĝintoj.

Viktorio gajnis la Ŝildon por aktorado kaj Kvinlando la Ŝildon por kantado. Du ruĝaj rozplantoj simbolantaj pacon kaj amikecon estis plantitaj ĉe la loĝejo, Kolegio Sankta Georgo de Universitato de Okcidenta Aŭstralio.

Plej grave, ĉe la jarkunveno de AEA, la membraro akceptis la proponon de la estraro starigi elspezprioritataĵojn por 2002 sub la tri rubrikoj Informado, Instruado, kaj Eksteraj Rilatoj, kio inkluzivas antaŭenigi ligojn por la nova komisiono pri Oceanio.

Pro nuntempa manko de homfortoj en Tasmanio, la estraro akceptis la inviton de Viktorio okazigi la 19an Aŭstralian Somerkursaron de Esperanto en januaro 2003, sed prefere en alia urbo ol Melburno por ebligi varbadon de novaj interesotoj. Atentu la kalendaron!

## Somerkursaro 2002

raporto de Komitato de Somerkursaro 2002

Laŭ la kompletigitaj demandoj kaj afablaj retpoŝtmesaĝoj senditaj de partoprenintoj, ĉiuj ĝuis la okazon en Perto. Dankon pro la pozitivaj respondoj kaj ĝeneralaj komentoj, kiuj helpas plani estontajn somerkursarojn. Trish O'Connor nun plene komprenas la senĉesan laboron faritan por organizi pasintajn somerkursarojn dum tiom da jaroj.

Ni ŝatus danki al la instruistoj pro

ilia valora instruado, kiu helpis grandan nombron da lernantoj atingi nivelon sufiĉe altan por fari ekzamenojn. Dankon pro via kuraĝigo al la komecantoj, tiel ke ili ne nur jam lernis multon sed ankaŭ daŭre volas lerni Esperanton. Ni ricevis plurajn enketojn pri Esperanto dum la Somerlernejo kaj ni intencas baldaŭ starigi klasojn por novaj komecantoj.

Dum la somerkursaro okazis ek-



spozicio de lingvoinstruiloj, faritaj de LOTE TEACHING AIDS en Perto. Ĉi tiu entrepreno vendas lingvohelpilojn al lernejoj tra Okcidenta Aŭstralio. Ekde 2002, ĉiu priskribo en la katalogo haveblas en Esperanto (danke al esperantistoj kiuj tradukis la katalogon dum la somerkursaro). Ĉi tiu iniciativo viglos nur dum Esperantistoj subtenos ĝin, do bonvolu serĉi la entreprenon per Interreto, ĉe:

[www.loteteach.com.au](http://www.loteteach.com.au)

kaj fari mendojn.

Fotoj de la somerkursaro videblas interrete, ĉe:

[www.iexpress.net.au/~esperanto](http://www.iexpress.net.au/~esperanto)

kaj

[www.yourphotos.com/viewalbum/a.cfm?aid=14946](http://www.yourphotos.com/viewalbum/a.cfm?aid=14946)

Alan Mendelawitz kaj aliaj fotis multajn okazojn kaj homojn, kio estas dankinda servo por ĉiuj. Alan ankaŭ respondecas pri la financa enketo kiu taksos la elspezajn kutimojn de la vizitintoj el ekster Okcidenta Aŭstralio. Ĉi tiu informo uzeblas por subteni petojn por mondonacoj kaj por allogi komercajn subtenantojn de estontaj somerkursaroj.

Finan raporton preparas Trish O'Connor; ekzemplero sendatos al Melburno por helpi la planadon de la somerkursaro 2003. La registriĝo-datumo farita de Debra McCarney kunsendatos, ankaŭ kompaktdiska teksto de la somerkursara broŝuro. Ni esperas ke tiuj faciligos la registriĝon kaj la vivon de la organizontoj. □

## La nova Oceania Komisiono raportas Kep Enderby

Kvankam nur informado, bonvolu trakti la sekvantajn kiel protokolon de la perta okazaĵo rilate la restarigon de nova UEA-komisiono "Oceanio".

La starigo de Oceania Komisiono, same kiel ĉiuj komisionoj tiaj, estas ago de UEA kaj ne de AEA. La finan konsiston de la komisionanoj devas aprobi UEA.

Okazis kunsido la 7-an de januaro pri kiel plej bone reaktivigi kaj fortigi la "Oceanian Komisionon". Prenis parton proksimume 20 homoj. Aliajn paroladojn pri la komisiono faris Kep dum la ceteraj du semajnoj de la kunsidoj en Perto, por instigi aliulojn interesiĝi pri la laboroj kaj taskoj de la komisiono. Sukceso sekvis, kiam Jennie Bishop, Penny Vos, Daniel Forrest kaj John Abood anoncis sian pretecon aliĝi al la antaŭa grupo de oceanianoj.

Kep prezentis argumentojn rilate la gravecon de Darvino en estontaj laboroj de la komisiono, kaj pro tio John

Abood, kiu havas kontaktojn kun bahaaj amikoj en Darvino, konsentis agi kiel nova kunordiganto de la nova komisiono.

Darvino estas la pordego de Aŭstralio al landoj kaj insuloj nordaj. Ĉar Kep estis ministro en 1973, kaj tiam respondecis pri la Norda Teritorio, li certas ke li gajnus iom da publika atento de la tieaj amaskomunikiloj. La grundo fekundas por Esperanto pro la multkultura socia konsisto de la darvinanaro. Bedaŭrinde nunmomente estas nur unu esperantisto en la Norda Teritorio, Rozalie Schultz, kaj ŝi loĝas ne en Darvino, sed en Katerino.

La 16-an de januaro estis akceptite ke la komisiono konsistu el John Abood, Kep Enderby, Bradley McDonald, Paul Desailley, Brian Fox, Gwenda Sutton kaj Penny Vos.

Espereble aliĝos ankaŭ diversaj aliaj.

Oni provu plivastigi la laborojn por

ke ankaŭ landoj kaj insuloj kiaj ekz. Nova Gvineo kaj Indonezio, kiel ankaŭ Singapuro kaj Malajzio, estu inkluditaj. Tial treege gravas ke Darvino ludu sian rolon.

AEA jam esprimis ke ĝi pretas helpi finance. Tamen gravegas ke ankaŭ Novzelanda Esperanto-Asocio kunhelpu! Tre verŝajne helpos ankaŭ UEA.

[El *Tamen Plu*] □

## Deziras Korespondi

**DINKO PAVLOV**, Str. Car Samuil-61, 8000-Burgas, Bulgario: Mi estas malnova esperantisto, sed pro diversaj kaŭzoj dum kelkaj jaroj mi ne korespondis kun samideanoj. Nun mi denove deziras korespondi kun esperantistoj de la tuta mondo, sed mi ne povas trovi adresojn por tio.

Mi estas 59-jara maristo, nun pensiulo, kaj min interesas poŝtkartoj (bildaj), malnovaj poŝtmarkoj, pop-muziko. Eble reciproka gastigo. □

## Nekrologo Sydney Grant 1920-2001

Mortis je 3/10/01 fidela membro Sydney Grant.

Sid estis tre rimarkinda homo kaj havis tre rimarkindan vivon. Li naskiĝis en Anglujo en 1920, el instruistino kaj fervojstaciestro. Forlasinte la gepatran hejmon kaj laborinte en fabrikoj, li tuj antaŭ kaj dum la dua mondmilito estis en la armeo, parte en la kavalerio por rajdi ĉevalojn, sendatis al Palestino por militi tie, kaj poste al Jugoslavujo por ankaŭ tie batali. La kruelegaj spertoj tie (kie la hitlera armeo detruis vilaĝojn de nur malsanuloj, maljunuloj, infanoj, kaj virinoj) faris lin pia kaj fervora kristano.

En 1950 li elmigris al Aŭstralio, laboris en Adelajdo ĉe la fervojoj, kaj post tiom emeritiĝis al Port Lincoln por la resto de sia vivo. Krom legi Esperantajn librojn kaj preni parton en pluraj Somerkursaroj kaj AEA-kongresoj, lia vivo en Port Lincoln okupiĝis nur pri helpado al aliaj homoj, precipe maljunuloj, malsanuloj, kaj malriĉuloj (honto ke tiaj ekzistas en nia lando!).

Ĉiajn imageblajn kaj neimageblajn laborojn li faris por ili, volontule. Diris amikoj liaj: “Li ne estis kontenta, se li ne povis helpi aliajn”. “Pli ol iu alia li proksimis al sanktulo”. “Kiom pli bona la mondo estus, se ekzistus pli da tiaj homoj”. “Li verŝajne savis kelkajn homojn pro sia helpo”. “Tiaj homoj aperas nur unu en cent jaroj”. “Por savi okinfanan patron, li kulpigis sin pri fervojakcidento”. “Sid devus beatigati kiel sanktulo”. “Li estis la plej miriga homo”. “Malgranda laŭ korpo, granda laŭ koro”. “Vera sinjoro, superreganta nin ĉiujn”. “Mi neniam renkontis homon kiu donis pli kaj petis malpli ol Sid”.

Sid estis dumviva membro de AEA. Lia lerninteco de Esperanto estis bona, kaj li posedis la Mezan Diplomon. Ĉar li estis tre modesta homo, oni ne ofte aŭdis lin en kuvenoj, sed li estis tie kaj sekvis la diskutojn.

Loĝinte, dum unu Somerkursaro, en sama hotelo kun li, mi povas diri ke mi neniam renkontis personon tiom helpeman kaj afablan, kiom estis Sid. Li vivis malrapide, sed lia koro estis varma por siaj kunhomoj, kaj liaj unuaj pensoj ĉiam, senescepte ĉiam, estis: “Kiel mi povas helpi ŝin aŭ lin?”. Bonega amiko kaj fidela Esperantisto forpasis el inter ni.

Verkis Marcel Leereveld □ Advokataĵoj



## POR RIDIGI VIN



1. “Nu, doktoro, ĉu ne estas vere ke kiam persono mortas dum dormo, li ne scias tion ĝis la sekva mateno?”
2. “La plej juna filo, la dudekjara — kiom da jaroj li havas?”
3. “Ĉu vi ĉestis kiam oni fotis vin?”
4. “Ĉu vi estis tie sola, aŭ nur vi mem?”
5. “Ĉu estis vi aŭ via pli juna frato kiu mortis dum la milito?”
6. “Ĉu li mortigis vin?”
7. “Ĉu vi estis tie ĝis la momento kiam vi foriris?”
8. “Kiom da fojoj vi vin mortigis?”
9. *Demando:* Do, sinjorino, la dato de la nasko de via filo estas la 8.8?  
*Respondo:* Jes.  
*Demando:* Kaj kion vi faris en tiu tago?
10. *Demando:* Ŝi naskis tri infanojn, ĉu?  
*Respondo:* Jes.  
*Demando:* Kaj kiom el ili estis filoj?  
*Respondo:* Neniu.  
*Demando:* Kaj ĉu estis filinoj?
11. *Demando:* Vi diras ke la ŝtupoj kondukis malsupren al la teretaĝo, ĉu?  
*Respondo:* Jes.  
*Demando:* Kaj ĉu tiuj ŝtupoj kondukis ankaŭ supren?
12. *Demando:* Sinjoro Slatery, ĉu vi iris al mielmonata ferio?  
*Respondo:* Jes.  
*Demando:* Kaj ĉu vi kunprenis vian novedzinon?
13. *Demando:* Kiel finiĝis via unua ge-

edza vivo?

*Respondo:* Per morto.

*Demando:* Kies morto?

14. *Demando:* Ĉu vi povas priskribi la personon?  
*Respondo:* Li estis alta kaj havis barbon.  
*Demando:* Ĉu la persono estis viro aŭ virino?
15. *Demando:* Doktoro, kiom da nekropsioj vi faris je mortintoj?  
*Respondo:* Ĉiuj de mi faritaj nekropsioj estis faritaj je mortintoj.
16. *Demando:* Ĉu vi memoras je kiu horo vi ekzamenis la kadavron?  
*Respondo:* La nekropsio komenciĝis ĉirkaŭ 08.30.  
*Demando:* Kaj ĉu la nekropsiato estis morta tiuhore?  
*Respondo:* Ne, li estis sidanta sur la tablo mirigite kaj demandante al si kial mi faras la nekropsion.
17. *Demando:* Ĉu vi kapablas doni urinan specimenon?  
*Respondo:* Mi faris tion jam kiam mi estis bebo.
18. *Demando:* Kiam estas via naskiĝtago?  
*Respondo:* La 15-an de julio.  
*Demando:* En kiu jaro?  
*Respondo:* Ĉiun jaron.
19. *Demando:* Kiomjara estas via filo kiu loĝis kun vi?  
*Respondo:* 38 aŭ 35, mi ne memoras precize.  
*Demando:* Kaj kiom da tempo li loĝis kun vi?  
*Respondo:* 45 jarojn.
20. *Demando:* Kie precize okazis la akcidento?  
*Respondo:* Prosimume je mejloŝtono 499.  
*Demando:* Kaj kie troviĝas mejloŝtono 499?  
*Respondo:* Probable inter mejloŝtonoj 498 kaj 500.

Tradukis el la angla Josef Šemer.  
Represita (kun modifoj) el *Israla Esperantisto*.



## Recenzas via Redaktoro



**Trevor Steele:** *La fotoalbumo*, vol.1.  
Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo,  
2001. 366p., broŝ.

Takso: 🍷🍷🍷🍷.

### Romano

Nia amiko kaj kolego Trevor Steele regalas nin per ankoraŭ plia romano, kaj la indiko ke temas pri “Unua volumo” ekscitas la apetiton legi pli.

Mi legis ie recenzon, en kiu la recenzinto esprimis sian malfeliĉecon ĉar li anticipis vidi fotojn en ĉi tiu libro, sed eĉ ne unu foto, nek eĉ unu bildo, estas en la tuta volumo. Temas, kompreneble, pri imagobildoj, fotoj kiujn la leganto, kune kun la verkinto, imagas ĉe la komenco de ĉiu ĉapitro. Nekutima, kaj por ĉi tiu romano mirige inspirita, maniero verki fikcian verkon. Efektive, ne estas vere prave paroli pri “ĉapitroj” en ĉi tiu verko, ĉar neniu el ili estas nomita aŭ numerita, kaj ne troviĝas tabelo de enhavo. Ĉu estas tamen strange, ke de la manoj de talentega verkisto, la leganto ne sentas mankon?

La naturo de la romano estas temo jam antaŭe provita de multaj verkistoj; mi pensas, ekzemple, pri *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwartz. Sed Trevor multe pli sukcesis ol Schwartz — nu, Schwartz ne estis vera romanisto, kaj li ne sciis mem redakti sian verkon por elsarki la tedajn partojn. Ĉu Trevor redaktigis sian romanon, mi ne scias (mi suspektas ke ne); sed la leganto vane serĉas en ĝi teda(j)n parto(j)n.

La intrigo de la romano: ni sekvas la vivon de Patrick O'Shea, lia edzino Diana, kaj iliaj sep infanoj: Matt, Sean, David, Vanessa, Rita, Zoe, kaj Bernie. Ili loĝas en malgranda vilaĝo nomata Aglo-Nesto, en Kvinslando.

Diana estas katoliko, Paddy (t.e. Patrick) estas, nu, nereligia, pli ofte kontraŭreligia, kaj religiaj aferoj grave kaj abunde rolas en la romano. Paddy kaj Di geedziĝis en januaro 1939, sed la rakonto vere komenciĝas en 1944, kaj la lasta “foto” estas el la vintro, aŭ frue post la vintro, de 1965.

Kompreneble la vivoj de la naŭ ĉefrolantoj multmaniere kunligiĝas, tiel ke necesas post vinjeto el la vivo de unu el ili transiri al vinjeto el la vivo de alia, ktp. La verkista genio de Trevor Steele montriĝas per tio ke ni neniam sentas ĝenon pro tio. Male, ju pli ni legas la detalojn de ĉiu el tiuj personoj, des pli ni kredas kompreni la tutan familion.

Ĉu la vivoj de naŭ tre ordinaraj Aŭstralianoj povas vere interesi? Neniu el ili estas “gravulo”, nenio kion la mondon taksus kiel “ekscitan” estas en ilia vivo. Neniu “intrigo” estas en la rakonto; malgraŭ tio, fininte la legon de la romano, mi esperis ke vere aperos dua volumo, ĉar la rolantoj fariĝis miaj intimaj amikoj.

Nu, mi ne volas apoteozi Trevor-Steele-n. Li ankoraŭ ne atingis la rangon de Graham Greene, kiu iom similele ekzamenis la psikojn de siaj romananoj. Sed Trevor rapide proksimiĝas al tiu rango; lia *Neniu ajn papilio* komencis moviĝi en la direkto de *Brighton Rock* de Graham Greene; *La fotoalbumo* iras en la direkto de *The Heart of the Matter*. Ambaŭ aŭtoroj havas gravan komunan trajton: ili verkas el propraj personaj spertoj tre kompleksaj, kaj per siaj romanoj penas iom post iom koni sin mem.

Kion pli diri, do? Se vi ĝuas veran literaturon, ĉi tiu romano plenumos viajn legespejojn. □

**Wouter F. Pilger:** *Baza esperanta radikaro*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2001. 159p., broŝ.

Takso: 🍷🍷🍷🍷

Malgrandformata libreto, kiu listigas iom pli ol 2700 vortojn, ĉiu kun simpla difino en Esperanto, kelkfoje ankaŭ kun ekzemploj.

La vortaro estas bazita sur la *Baza radikaro oficiala* eldonita en 1972 de la Akademio de Esperanto. Tiu 1972-Akademia verko celis esti konsultlisto por preparantoj de vortaroj kaj de lernolibroj, kaj ĝi bone rolis tiel en la kompilado de ĉi tiu verko.

La nukleo de la vortaro estas la (proksimume) mil plej oftaj radikoj en Esperanto, el kiuj ĉiuj estis oficialigitaj de la *Fundamento* aŭ de la Akademio. Ĉiu el tiuj vortoj estas signita en ĉi tiu verko, por ke la uzanto povu rekoni ĝian fonton. Aldoniĝis al tiuj mil vortoj ĉirkaŭ ankoraŭ pli ol milo da oftaj vortoj (plejparte oficialaj), kaj ducento da teknikaj terminoj bezonataj en la difinoj. Do kvankam la vortaro neniel estas kompleta, ĝi ja provizas grandan kvanton da ĉiutagaj vortoj.

Konsilata estas ke la uzanto (ĉu novlernanto, ĉu “progresinto”, lernu ĉiujn vortojn en la *Baza esperanta radikaro* [BER], por povi senĝene konversacii kaj kompreni ordinarajn skribitajn tekstojn.

Pro la kompilmetodo, mankas neologismoj en la BER, do la uzanto ne lernas neaprobindajn vortojn; tamen mankas multaj ĉiutagaj necesaj terminoj (ekzemple: se oni limigas sin al BER, la uzanto povas veturi per aŭto, trajno, tramo, pramo, eĉ ŝipo, boato, aŭ aviadilo; sed, bedaŭrinde, ne per taksio aŭ buso — ĉar tiuj du vortoj mankas en BER). □

**Dante Alighieri:** *Purgatorio*. Ilustraĵoj de Gustav Doré. Tradukita de Enrico Donde. Chapecó (Brazilo): Fonto, 2001. 255 grandformataj paĝoj.

Broŝurita.

Takso: 🍷🍷🍷 aŭ 🍷🍷🍷🍷

Enrico Donde kaj Fonto entreprenas tre grandan projekton: kompletigi la esperantan tekston de *Infero* (tradukita de K. Kalocsay antaŭ multaj jaroj) per tradukoj de la aliaj du partoj de *La dia komedio: Purgatorio kaj Paradizo*. La eldono de *Paradizo* devos atendi, sed nun aperis *Purgatorio*.

La libro estas dulingva. Sur ĉiu paĝo en maldekstra kolumno aperas la originala 14-jarcenta teksto de Dante, kaj en dekstra kolumno paralela traduko Esperanto-lingva. La traduko lerte sekvas la rimskemon de la originalo, kaj uzas modifitan formon de la metrika skemo originala.

Ne estas facile legi la poemegon; sed multaj enkondukaj eksplikoj, de la tradukinto Enrico Donde, multe helpas.

La perglua broŝurado estas malfortika, kaj la paĝoj facile elfalas. □

### Sukcesis en la Baza Ekzameno

Paul Green (Qld)  
Owen Loneragan (WA)  
John Massam (WA)  
Keith Massam (WA)  
June Perkins (Qld)  
Sheryl Ridout (WA)

### Elementa Ekzameno

Henry Broadbent (Vic)

### Meza Ekzameno

John Abood (Qld)  
John Harvey (WA)  
Rochelle Jacquier (SA)  
Eileen Jones (SA)  
Owen Loneragan (WA)  
Matthew Maguire (NSW)  
June Perkins (Qld)  
Katerina Taggart (SA)

Informis Marcel Leereveld

## For the Beginner

by Donald Broadribb

### *What on earth does “transitive” mean?*

Most Australians who finished their schooling in the past 30 years have never been introduced to the idea of “transitive” in grammar, and most of the rest of us would be hard put to it to explain what it means. This spells trouble when using Esperanto textbooks and dictionaries. They assume the user is well acquainted with the distinction between transitive/intransitive, so they blithely label various roots with the mysterious symbols *tr* and *ntr*.

In some European languages the distinction between “transitive” and “intransitive” is still very much alive, and Esperanto was modeled on them in this respect. Unfortunately, to all intents and purposes, the English language lost any clear concept of the distinction centuries ago. Only tiny traces are still to be found, specifically in a small handful of verbs.

Esperanto, on the other hand, makes considerable use of the distinction between “transitive” and “intransitive” verbs, so it will be worth our while to try to work out a simple way of understanding the whole thing. Let us begin with a very simple sentence:

*I see Robert*

Notice that in “I see Robert” the three words express three ideas:

*I* the person doing something (in grammar this is called the “subject” of the sentence).

*see* what I am doing (in grammar this is called the “verb”).

*Robert* the object of my action. (In grammar this is called the “direct object”).

Esperanto writes this sentence as:

*Mi vidas Roberton.* Notice that the third word has *-n* added to it. This indicates that Roberto is the “direct object,” and helps distinguish between who is being seen and who is doing the seeing. In theory, because the *-n* is there, the three words could be arranged in any order and the meaning would be the same.

But now let us look at what we would have expected to be very similar:

*I listen to Robert.* What on earth is the word *to* doing in this sentence?

In Esperanto the sentence is written just like the first one:

*Mi aŭskultas Roberton.* Just like *Mi vidas Roberton.*

Why the difference in English but not in Esperanto?

In English *see* is used as a “transitive” verb: it can be followed directly by the object of the action it expresses.

*Listen* in English is used as an “intransitive” verb: it cannot be followed directly by the object of the action it expresses. It has to have an additional helping word, *to*, used with it. There are other helping words (in grammar they are called “prepositions”) often used in a similar way in English: *for, from, of, in,*

and various others.

We can work out two principles, now:

1. Esperanto considers many (actually, most) verbs to be “transitive” — they can be directly followed by the object of their action, and the object of their action is specified by *-n* on the end of the word.

2. The corresponding English verb may or may not be used the same way.

This is the first hurdle in learning Esperanto verbs: you must learn which verbs are allowed to be directly followed by the object of their action, which then is given the ending *-n*<sup>1</sup>. Realize that this does not always reflect how the corresponding verb is used in English.

**Some** verbs simply cannot be used “intransitively” in Esperanto, and it is very important to learn which ones, because they may never be followed by *-n*. Let’s look at a few of them in action:

*He is Robert. .... Li estas Roberto.*  
*She became a singer. .... Ŝi fariĝis kantisto.*  
*They came from Ireland. .... Ili venis de Irlando.*  
*Who will go to the store? .... Kiu iros al la butiko?*<sup>2</sup>  
 and, in general, any verb that has *-iĝ-* in it.

English speaking students of Esperanto usually slip up by making one of three mistakes:

1. Forgetting that *est-* and *-iĝ-* must not be followed by *-n* on the next word.
2. Putting *-n* indiscriminately on anything that follows a verb.
3. Or, the reverse: completely forgetting to use *-n* where they should.

Again: be sure to remember that *estas* and *-iĝas* are **never** followed by *-n*.

If this were all there were to the “transitive” and “intransitive” matter, it would not be very difficult to remember. But unfortunately there are some complications.

## Two objects?

It is usual in English to say *I gave him the book*. Esperanto, on the other hand, forbids us to say something like *Mi donas lin la libron*. How do we say this in Esperanto, then? The answer is that we can use a slightly different way of saying the same thing, in English, and this is how Esperanto says it:

*I gave the book to him. .... Mi donis la libron al li.*

1. Interestingly, when L.L. Zamenhof first worked out the principles of Esperanto, he realized that this “transitive/intransitive” distinction could be hard for many people, and suggested that in practice *any* verb could be used as if “transitive” and followed by *-n*, if the student was puzzled about it. But for various reasons Esperanto usage has let this principle fall by the wayside, since around 1910 or so.

2. Zamenhof would have said *Kiu iros la butikon?* but Esperanto usage has almost entirely forbidden using the verb *ir-* in that way.

In Esperanto, only the longer way of saying it is permitted; and we are in fact allowed to change the order of the words more or less as we like:

*Mi donis la libron al li.* Or, equally OK: *Mi donis al li la libron.* Or, even, *Mi al li donis la libron*, though this word order is not common.

As a rule, only one *-n* can be used at a time. How do we decide which word is to get the *-n*? Usually this problem arises when we are talking about a person and a thing — the answer is to put the *-n* on the “thing” and use an extra word before the “person”. For instance:

*I showed Mario the book.* Is *Mario* or *book* the word that is to end with *-n* in Esperanto? Answer: *Mario* is a person, while a *book* is a thing; so we put the *-n* on the word that means “book”: *Mi montris al Mario la libron.*

Some more examples:

*I heard Beethoven's symphony* ..... *Mi aŭdis la simfonion de Bethoveno.*

*Who told you the news?* ..... *Kiu diris al vi la novaĵojn?*

*Margaret wrote me her address* ..... *Margareto skribis al mi sian adreson.*

### There are lots of troublesome verbs:

Most Esperanto verbs are “transitive”; they involve **doing** something to someone or to something — maybe literally, maybe only metaphorically. This is by no means always the case with the corresponding English verbs.

For example, suppose we take two simple sentences:

*He ended the lesson* ..... *Li finis la lecionon*

*He began the lesson* ..... *Li komencis la lecionon*

Both English and Esperanto see these sentences as made up of subject + verb + direct object.

But we can also use these verbs in a different way, in English:

*The lesson ended*

*The lesson began*

Esperanto does not allow us to use simply *finis* or *komencis* in these sentences. It requires us to say:

*La leciono finiĝis*

*La leciono komenciĝis*

Gramatically: these two verbs are “transitive” by nature, and can be made intransitive only by adding *-iĝ*. Put another way: the lesson did not “do” anything to something, but *komenc-* and *fin-* in themselves **do** mean doing something to something. The *-iĝ-* indicates that we are using them simply to mean that something happened, but not that anyone did anything to anyone.

There are many other verbs which present a similar problem to English speakers. For example:

*John folded the card in the middle. ...Johano faldis la karton en la mezo.*

*The card folded in the middle. ....La karto faldiĝis en la mezo.*



*John will wake me at 7 a.m. ....Johano vekos min je la sepa matene.  
I'll wake at 7 a.m. ....Mi vekigōs je la sepa matene.  
Mario hid a book behind the sofa. ....Mario kaŝis libron malantaŭ la sofo.  
The child hid behind the sofa. ....La infano kaŝiĝis malantaŭ la sofo.*

**However:** Although by far the vast majority of Esperanto verbs are like this, not all of them are. English speakers who study Esperanto very often trip up over this fact. Look at the following example:

*John is sitting on the chair. ....Johano sidas sur la seĝo.  
Who sat him there? ....Kiu sidiĝis lin tie?*

In Esperanto *sid-* is considered to be an “intransitive” verb. In other words, it only means *to be sitting*; to make someone else sit requires us to put *-ig-* in with it. *-ig-* is very much like the opposite of *-iĝ-*.

Here are more examples:

*The boards are standing up against the wall. ....La tabuloj staras ĉe la muro.*

*John stood the boards up against the wall. ....Johano starigis la tabulojn ĉe la muro.*

*The telephone rang. ....La telefono sonoris.*

*Ring his phone. ....Sonorigu lian telefonon.*

*This food is hot. ....Ĉi tiu manĝaĵo varmas.*

*Please heat this food. ....Bonvolu varmigi ĉi tiun manĝaĵon.*

*The water boiled. ....La akvo bolis.*

*I boiled it in the kettle. ....Mi boligis ĝin en la poto.*

*The noise stopped at 11 p.m. ....La bruo ĉesis je la 11a vespere.*

*Stop that noise! ....Ĉesigu tiun bruon!*

*His work continued non-stop. ....Lia laboro daŭris senhalte.*

*He continued his work. ....Li daŭrigis sian laboron.*

You might be able to work out in your mind some idea as to which Esperanto verbs are considered to be “transitive” and which are considered to be “intransitive”, but be warned: there is no rule for this that holds up without exception.

Native speakers of other languages often face a similar problem when learning Esperanto, because exactly which verbs are treated as “transitive” or “intransitive” varies from language to language. So the Esperanto verbs that give you trouble are not necessarily the ones that give a French or Spanish or Chinese or Japanese person trouble.

Also, as with all languages, in well over a hundred years of usage Esperanto has developed a number of inconsistencies, and some were there right from the beginning. Naturally, there are “purists” who insist that some familiar usage is “wrong” and only something else is “right”. But insisting on this usually leads to

more trouble than is easy to cope with. It seems better to accept what has become accepted usage, at least as far as dealing with other people's speech or writing goes, even though you personally might prefer something different.

## Transitive and Intransitive

by Marcel Leereveld

Compare the following types of verbs (= action words):

**A.** Yesterday he *took*

On Friday my father *gave*.

Yesterday he *took* my book.

On Friday my father *gave* a party.

These verbs must have a so-called "object" with them (*my book, a party*), because one can't take or give without taking or giving something or somebody (*my book, a party*).

**B.** We shall *eat* at 7 o'clock a.m.

You must *obey* without delay.

We shall *eat* bread and cereals.

You must *obey* her.

These verbs can be used with a so called "object," because one can eat *something* (*bread and cereals*) and one can obey *somebody* (*her*), but they can be used also without an "object" (one can't eat "7 o'clock" nor obey "delay").

**C.** The whole day she *slept*.

Today they can't *swim*.

The sun *is shining*.

He *fell* from the roof.

They are actions that can't have a so-called object, because one can't sleep, swim, shine, or fall somebody or something.

**D.** They *seem* (to be) quite exhausted.

He *is called* Peter.

She *remains* adamant.

I *am* perplexed.

These verbs are all variations of "am, are, were, equals," etc., and normally need a word or phrase (*quite exhausted, Peter, adamant, perplexed*) to complete a sentence. They are called copulas.

The verbs falling under A and B are called "transitive verbs," because their actions go, or can go, over (transit) to a so-called "direct object" (*my book, a party, bread and cereals, her*).

The verbs under C and D are called "intransitive verbs," because their actions can't go over to a "direct object," they are self-contained (the actions in the examples above are *to sleep, to swim, to shine, to fall, to seem exhausted, to be called Peter, to remain adamant, to be perplexed*).

In general terms (but by no means always): what nature does, and what we do to ourselves, are intransitive verbs, and what we do to things around us are transitive verbs.

Intransitive: He *is dreaming*.

I could *lie* on the beach the whole day.

Transitive: We should not *forget* our umbrellas.

He *was cutting* the wood.

The problem arises because English, again, often does not follow the rules. This becomes a nightmare when we have to translate from English into other European languages (which nearly always follow the above rules) or into Esperanto (which always follows the rules).

The difficulty is this: a large number of verbs (action words) are used in English with two different meanings, resulting in somebody doing an action to something (*he changed the tyres*), or something doing the same action to itself (*The weather changed*).

In English one can walk without walking (*walking a dog while riding a bicycle*), or one can boil without getting hot (*the water boils = gets hot; but I boil the water I don't get hot*); or one can stand while sitting (*I can stand a joke*); or one can hang without hanging (*he has hung the picture*); or one can suffocate without suffocating (*he suffocated a wild cat*). Other languages, and especially the reliable Esperanto, would not dream of being so illogical.

In Esperanto, if the weather changes, it changes itself (*ŝanĝiĝas*). but if I change (*ŝanĝas*) my plans (not myself, as the weather does), Esperanto (and other languages) must use two different verbs, because there are two different actions. In a similar case, I can want a person without wanting him: "I want you to leave" (*Mi deziras, **ke** vi foriru*. You couldn't say *Mi deziras vin foriri*, because *mi ne deziras vin*).

Here are some of the many dozens of English verbs with two meanings (generally one intransitive and one transitive):

**to stop:** La milito fine ĉesis (intr.) ..... Kiu ĉesigis la motoron? (tr.)

**to burn:** La ligno bone brulas (intr.)..... Ne bruligu vian manon. (tr.)

**to drown:** Nia kato dronis. (intr.)..... Ĉu iu dronigis ĝin? (tr.)

**to grow:** Nur herbaĉoj kreskas tie. (intr.) ..... Kreskigu ion alian. (tr.)

**to run:** Li kuris 3 km. (intr.) ..... Ne tro kurigu la ĉevalon. (tr.)

**to work:** Ili laboras furioze. (intr.)..... Ni laborigas la maŝinon. (tr.)

**to drive:** Mi veturis (intr.) hejmen, ĉar mi veturigis mian aŭton (tr.).

**to bend:** La arbo kliniĝis (intr.) ĉar mi klinis ĝin (tr.).

**to divide:** Dividu la kukon! (tr.) ..... Ĝi facile dividiĝas en ses. (intr.)

**to finish:** Finu la ekzercon (tr.)..... La leciono baldaŭ finiĝos. (intr.)

**to begin:** Komencu la manĝon (tr.) ĉar la teatraĵo baldaŭ komenciĝos (intr.)

**to measure:** Mezuru la distancon (tr.)..... Ĝi mezuriĝas tri km (intr.)

**to turn:** Ŝi turnis sian kapon (tr.) kaj li kapturniĝis (intr.).

Those who took part in the Perth Summer School received a comprehensive list of these strange English verbs (in full sentences).

Great care should be taken to choose the right verb in Esperanto for these double-meaning English verbs, so as to avoid the misunderstandings that English can cause in international communication.

In the book *Por ĝuste uzi Esperanton* can be found (on pages 39 and 40 of the 4th edition) an alphabetical list of all the official intransitive verbs in Esperanto. Those not mentioned are transitive.

In the next *ĈK* we shall find out why it is so necessary to know which verbs are transitive and which intransitive. □

## Poŝtkartoj de John Bailes

Raporto de Ralph Harry

Antaŭ pluraj monatoj AEA ricevis kolekton de poŝtkartoj de Norma Falkner, heredinto de John Bailes kiu estis frua aŭstralia Esperantisto loĝanta kaj instruanta en Pambula NSW ĉ. 1897-9.

Karto de 27-07-1908 el Battersea (Anglio) mencias ke Bailes estis studenta Esperanton de nur tri monatoj. Estas kartoj ĝis 1911, kaj post tio kelkaj readresitaj el Pambula.

La 196 poŝtkartoj estas nun organizitaj laŭ lando de origino:

Anglio (19): Londono (2), Portsmouth, Herne, Manchester, Berwyn (Kimrio), Norwich, Dover (2), Battersea (3 — Esperantlingva poŝtkarto: “La popoloj faros en konsento...!”), Ilford (3), Sunderland (2), Lyme Regis.

Aŭstrio (25): Moravia (Velherad & Borivoj — Cyrill kaj la skriba metodo, kaj Method), Unter-Themenau, Pardubice (2), Leipa, Kukleny, Kosovo/a, Kostelec n Orlici, Tabor, Hronov, Vsetin, Skutec, Lemberg, Pardubice, Dopisnice, Prague (3), Wien (3), Val Mezirici, Brno (Brnn), Lazne Belohrad, nevino (2).

Belgio (40)

Francio (50): Parizo (5), Nantes, Château-la-Villiere (5), Vierzon, Cher (2), Hénin-Lietard (5), Boulogne-sur-mer (23-2-11, unua 1905), Arron (Eure et Loir), Montagris, Lille, Besançon (3) (Montbozon, H. Saône), Courbevoie, Henin (Grupfoto), Amboise, St. Denis (Seine), Tours, Limoges (haute Vienne), Versailles, Véziers (Herault).

Germanio (25): Dresden (9. Unu presita en

Esperanto: “Korajn salutojn, la Operdomo”), Radebeul, Oberloessnitz, Aachen, Kotzschbroda, Berlin (2), Hamburg (4), Mulhausen (sviso) Magdeburg (2), Gotha, Eislingen, Nossen.

Hispanio (13): Madeira (2), Funchal (2), Antander, Manlleu (Katalonio) (2), Bilbao, Porto, Manresa & Sabadell (Barcelono), Murcia.

Norvegio (7): Trondheim (2), Hardanger, Nordcap, Frosta.

Rusio (17): St. Peterburgo, Kazano, Podolie, Stavropol (5), Minsk, Moskvo, Voronejo, Homel, Kizil-Arvat, Sandmir, Dvoranskaja, Kutno, Kassa.

Svislando (11): Thun, Zürich (2), Lelocle, Thalwil (3), St. Moritz-Dorf (kurso por 18), Radebeul, Lausanne, Ponts de Martel.

Usono (23): Norwich (NY), S. Dakota, Terre Haute (Ind.) (2), Gandy (Nebr.), Chicago (3), Saranac Lake (NY), Attalia (Wash.), Cleveland (Ohio), Hebron (Nebr.), Milwaukee, Austin (Minn.)

Diversaj (17): Belgio, Brazilo, Bulgario, Danlando, Figio, Japanio, Luksemburgo, Kanado, Nederlando, Nov-Zelando.

La poŝtkartoj temas ĉefe pri la interŝanĝado de poŝtmarkoj, sed kelkaj enhavas informojn pri la Esperantomovado. Komprenoble la bildoj kaj poŝtmarkoj mem havas iom da intereso... ekzemple: foto de la skribinto kaj membroj de la Esperanta grupo, informo pri la vetero, “la unua printempa birdkanto”, pafista festo. Kelkaj skribintoj estis juna fraŭloj — 18, 19 (fraŭlino), 20

de diversaj profesioj: instruistoj, librovendisto, ktp. Tre interesa karto el Varsovio (19-07-1908) rakontas pri la situacio de instruistoj en Pollando, kiuj deziras instrui en sia propra lingvo, kaj klerigi politike. “La afero prosperas en Germanio. Ni havas 190 grupojn.”

Hodiaŭ vespere mi mencias nur kelkajn aspektojn de la poŝtkartoj kiuj interesis min, kiu naskiĝis nur poste (en 1917, la jaro kiam D-ro Zamenhof mortis). Kelkaj el la skribintoj estis junuloj, aliaj estis instruistoj.

Kompreneble la poŝtkartoj, verkitaj en Esperanto, indikas kiel la skribinto aŭdis pri la deziro de John Bailes. Esperanto jam estis vivanta pro la gazetoj, ekzemple: *Tra la filatelio*, *Ĉirkaŭ la mondo*, *Lingvo internacia*, *The British Esperantist*, *Internacia pedagogia revuo*, *Adresaro de Esperantistoj*, de S-ro Legrand (Francio), de S-ro Desbrosses, al A. Wintersson, “per mia amiko, mia sveda amiko N. Rosenberg”.

La stilo kaj vortuzo tre similis nian modernan Esperanton, kvankam estis kompreneble malsimilaĵoj kaj eraroj. Ekzemple:

Cia letero. VxCia. Ĉu vi amas la ĉaso? Havu la boneco [bonvolu]. Ĉu vi interesas al la aeroplanoj? Mi forlasos tiun enuigantan vilaĝon. Kiaj markoj vi preferas?, interesanta karto, Univerzitato, donu mia adreso al alian, la villoj [viloj] de, mi skribis al kelkajn samideanojn, mi petas Via por ke vi sendu, mi ricevis via bela karto, multe de ilin, corespondanto, en mian leteron, tre multa simila, kara amikino, Esperas aŭdi de vi baldaŭ.

La fruaj Esperantistoj kelkfoje mencias eventojn kaj kutimojn en Esperantujo:

En 1908 S-ro White el Melburno starigis grupon sur la ŝipo SUEVIC. Rondiranta karto el Stavropol mencias la Esperantajn tradukojn de verkoj de Maksim Gorkij: *Boleŝĉjo*, *Kanto pri falĉo*, kaj *Rakonto de Filipp Vasiljic*. En Sud-Dakoto estis “sub-delegito de UEA”. Gluita sur kelkaj kartoj estis afiŝeto: JE DEZIRO — LA KORESPONDADO EN ESPERANTO (verda stelo, ruĝaj literoj). Sur karto el Cleveland (Ohio) 12 feb 1909 estis: “Mi esperas, ke vi

venos al la Kongreso en Chautauqua<sup>1</sup>, USA, en 1910”. (Mi memoris ke la 6a Universala Kongreso okazis en Washington en 1910, kun 357 partoprenantoj. Sed poste mi memoris ke en Chautauqua en 1908 oni organizis prelegojn sciencajn kaj literaturajn. El tio evoluis la Somera Universitato, en kiu sin registris 600 el la partoprenantoj de la UK 1925 en Genevo.)

Estas ankaŭ kelkaj *leteroj* el diversaj landoj: Japanio, Rusio (Enisei) 3, Luksemburgo (Belgio, Karloreĝo) ktp.

Letero de juna belgo rakontas detale pri piedekskurso tra la Nigra Arbaro.

Alfred Theis de Boulogne-sur-Mer priskribis tiun historian urbon kie okazis la unua Universala Kongreso en 1905, kaj en kiu li partoprenis. Ĉirkaŭ 10 000 el la 90 000 enloĝantoj estis, en 1909-10, angloj. Li priskribis aliajn Kongresojn, ekzemple tiun en Cambridge. Li diris: “Pro Esperanto kaj per Esperanto ni edziĝis”.

Entute la kolekto entenas sufiĉe da interesa informo por ke iu verku tezon pri la stato de Esperanto antaŭ la Unua Mondmilito. Mi esperas ke iu faros tion por la Klereca Ekzameno!

Prelego al la Zamenhof-festo de la Esperanto-Federacio de NSW, 15/12/2001.

#### Ce la psikiatro

La psikiatro al sia paciento:

“De kiam vi kredas esti hundo?”

“Jam de kiam mi estis hundido.”

\* \* \*

“Doktoro, mi ne estas hundo, mi estas homo!”

“Bone, bonvolu sterniĝi sur la kurac-tablon.”

“Dankegon ! Hejme neniu permesas al mi iri sur la divanon.”

\* \* \*

“Kial vi estas ĉi tie en mensmalsanulejo, kvankam vi tre ĝuste rezonas?”

“Ĉar, Doktoro, mi estas denaske surdmuta.”

Lorenzo Tomezzoli el retlisto anekdotoj-en-esperanto [laŭ Eventoj]

1. Populara eduko-feri-instituto en la okcidenta parto de la ŝtato Nov-Jorko. — [d]

## Esperanto — lingvo por ĉiuj — lingvo por ni

Jukka Laaksonen

Ambaŭ el la rubrikaj karakterizoj estas al ni konataj. La iniciatinto L.L. Zamenhof almenaŭ komence celis Esperanton kiel duan lingvon por ĉiuj — aŭ fakte pli ĝuste — por kiu ajn, sed ĝis nun ĝi restas pli-malpli lingvo por ni, la rondo familia. Multaj Esperantistoj kaj ne-Esperantistoj jam priprenadis la kialojn de tio, ke Esperanto ankoraŭ ne venkis. Oni krome diskutis eĉ pri tio, ĉu la venko de Esperanto entute estus pozitiva afero por la mondo.

Laŭ realisma vidpunkto, ekzistas almenaŭ tri faktoj kiuj certe influis al ne pli granda disvastiĝo de Esperanto. Unue, Esperantistoj kaj eĉ Zamenhof mem estis tro optimismaj kaj rapidemaj. Longe oni atendis la finan venkon okazi dum kelkaj jaroj aŭ jardekoj, sed nun jam oni konfesas ke tio ne povas okazi rapide.

Due, la ekstera mondo estis kaj restas tro skeptikema kaj eĉ timema rilate al planlingvo, kies avantaĝoj estas evidentaj. Kaj se la granda popolo en iu lando vidas Esperanton utila, tiam almenaŭ la registaro estas kontraŭ ĝi.

Tria fakto, kiu ĉie influas, estas ke oni ne povas antaŭvidi la estontecon. Malgrandaj, eĉ senintencaj agoj ie en la mondo povas kaŭzi subitan ŝanĝiĝon de la tuta monda situacio. En la

monda historio tre malmultaj homoj farante ion sciis ke ili komencis novan mondepokon per tiu ago. Kaj, krome, ekz. naturkatastrofoj estas tute neantaŭvideblaj. La mondo tuttempe ŝanĝiĝas kaj la movado devus tuttempe klopodi agi laŭ la plej utila maniero en ĉiu situacio.

Mi estas eble iom pesimisma, sed tamen ne volus esti tia. Mi kredas ke unu el la plej trafaj pensoj de Zamenhof estas ke “eĉ guto acida konstante frapante traboras la monton granitan”<sup>1</sup>.

Kvankam Esperanto estas mem-evidente klara kaj bona afero por ni, tamen konvinkigi tion al iuj aliaj estas ekstreme malfacile. Sed se ĉiam troveblas movadanoj kiuj senlace agas por la lingvo, tiam ĝi konstante kvankam eble ne rapide antaŭeniras. Kaj povas iam okazi ke iu hazarda ŝanĝo en la mondo montras al la tuta homaro ke ĝuste Esperanto estas *la* solvo. Ni do prizorgu pri tio, ke la gutoj ne ĉesu frapadi.

[El *Esperantolehti*, decembro, 6/2001.] □

1. La origina teksto de Zamenhof efektive estis “Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan”. *Proverbaro Esperanta* 725 [=#402 en la eldono redaktita de Camille Rogister, eld. J. Régulo, La Laguna, 1974]. — (d)



M. Surikato, viktimo de socia diskriminacio. Raporton legu sur paĝo 30.



## Interrete



• **Esperanto per Windows:** Nia membro John Massam atentigis pri tre simpla metodo tajpi la UNIKODAJN Esperantajn literojn en MICROSOFT WORD 2000:

• 1. Funkciigu la programon MICROSOFT WORD

• 2. En la menuaro apud la supro de la ekrano elektu "Insert", el tiu menuo elektu "Symbol" kaj el tiu menuo elektu "Symbols"

• 3. Inter la tiparoj listitaj, elektu la unuan: "(normal text)"

• 4. En la lasta linio de la tabelo kiu ekaperas, musumu sur ĉ kaj poste sur "Shortcut Key"

• 5. Kiam la nova fenestreto malfermiĝis, premu alt kaj samtempe c

• 6. Musumu sur "Assign"

• 7. Fermu la fenestreton.

Ripetu la ĉisuprajn sep paŝojn por ĉiu alia Esperanta litero. Asignu alt plus C, aŭ plus g, G, h, H, j, J, s, S, u, U por tiel asigni ĉiujn Esperantajn literojn.

De nun, vi nur bezonas premi alt plus c (aŭ C, g, G, kc.) por fari la koncernan Esperantan literon.

Se vi volas sendi tekston per e-poŝto, tajpu la tekston per WORD, poste kopiu ĝin en vian e-poŝtan programon.

• **www.edukado.net**



estas tre utila retejo por instruistoj, kaj ankaŭ por studentoj. Ĉe ĝi oni povas trovi detalojn pri multegaj Esperanto-lerniloj, diskutadi pri edukaj temoj, kc. Ĝi uzas UNIKODO-n, kaj por legi, kaj por mesaĝi/diskuti. Via redaktoro fervore rekomendas ĝin.

• **La Unio de Raciismaj Ateistoj kaj Agnostistoj (UAAAR)** — laboranta por la resamrajtigo de nekredantoj — aperigas siajn retpaĝojn en pluraj lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto, kion ili volonte utiligas por la internaciaj kontaktoj. Vizitu:

<http://www.uaar.it/uaar/esperanto.htm>

• **Elitrad — aŭtomata tradukado en Esperanton:**

En la plej parolataj lingvoj, angla, hispana, franca, germana jam de kelkaj jaroj ekzistas perinterretaj, rektaj tradukiloj, kiuj ebligas al la uzantoj traduki retpaĝojn aŭ tekstojn de nekomprenata, fremda lingvo al alia lingvo. Tiuj tradukoj faritaj de komputilo memkompreneble ne estas kompletaj tamen ili sufiĉe bone uzeblas kaj estas de tempo al tempo pli kaj pli popularaj.

Danke al "traduku.net" kaj al ĝia serviloprogramo "Elitrad" Esperanto estas la unua planlingvo kaj inter la plej unuaj, malgrandaj lingvoj en kiuj funkcias perinterreta traduka servo.

La servo anstataŭigas anglalingvajn vortojn kaj frazojn per samsignifaj vortoj kaj frazoj esperantlingvaj. Sekve, la rezulto ne estas vera traduko en norma Esperanto sed nur la angla en aliaj vortoj, kiun ni nomas "antaŭtraduko". Mankas akuzativoj, pluralaj adjektivoj, kaj la verboj plejparte montriĝas kiel radikoj (vid-, dir-, ven-, ktp.) sen la kutimaj finaĵoj. "La rezulto estas Esperanto, sed ne kiel ni amas ĝin."

Kaj tamen, la "antaŭtradukoj" estas sufiĉe kompreneblaj kaj jam utilas al la esperantistaro. Dum oni atendas perfektan tradukilon, oni proponas ĉi tiun provizoran servon, promesante ke

oni daŭre plibonigos ĝin. Gravaj informoj pri ŝanĝoj, plibonigoj estas anoncigitaj en diskutlistoj “soc.culture.esperanto” kaj “traduko\_net” ĉe YAHOO-GROUPS.

Elitrad povas remontri anglalingvajn retpaĝojn en Esperanto kun la originalaj aspektoj.

Kiel la jamaj tradukiloj en aliaj lingvoj, oni povas kaj tajpi, aŭ almeti anglalingvajn vorton, frazon aŭ alineojn al Elitrad por tuja traduko, kaj almeti la retadreson (URL) de iu anglalingva retpaĝo al Elitrad por vidi kompletan kopion de la paĝo en “antaŭtraduka” Esperanto.

Elitrad montras siajn antaŭtradukojn laŭ diversaj manieroj. Kelkaj ekzemploj:

- Unu traduko por ĉiu vorto aŭ frazo;

- Same, sed kun supersignaj numeroj. Metante la kursoron sur numeron, oni legas malsupre de la ekrano alternativajn tradukojn de la koncerna vorto aŭ frazo;

- Plena traduko. Tuj montras ĉiujn alternativajn tradukojn de ĉiuj vortoj aŭ frazoj. Utilas se oni volas redakti la tekston en norman Esperanton.

Elitrad estas kunlabora projekto realigata tute per Interreto, fare de Aaron Irvine (programado) el Carrickfergus (Norda Irlando) kaj Mike Leon (vortprovizo) el Lower Hutt (Nov-Zelando).

La servo Elitrad troveblas ĉe:

<http://www.traduku.net>. [El *Eventoj*]

- **La mirinda sorĉisto de Oz** en sia pdf-formo nun fine troveblas inter la elektronikaj libroj elŝuteblaj ĉe la adreso ... Kvankam la postaj 13 libroj de la Oz-romanserio de L. Frank Baum jam delonge troveblas en tiu serio de elektronikaj libroj, la unua kaj plej konata unua libro devis longe atendi, ĉar necesis multe prilabori la abundajn tre specialajn kolordesegnaĵojn sur kiujn la origina anglalingva

romanteksto estis presita; necesis reakiri la desegnaĵojn sen la tekstsurrepreso, kaj surprisi la Esperantan tradukon. Maloftege eĉ la anglalingvaj represo de la romano inkluzivas ĉi tiujn desegnaĵojn, pro la kosto kaj taskego reprodukti ilin malantaŭ la teksto. La pdf-dosiero ampleksas pli ol 17 megabajtojn. Trovu ĉe:

<http://www.esperanto.se/eLibrejo/>

La tradukitan tekston faris Donald Broadribb, kiu ankaŭ tradukis la aliajn 13 romanojn en la Oz-serio.

- **La retrevuo Esperanta Ŝako** de EŜLI (Esperanta Ŝak-Ligo Internacia) anoncas internacian retpoŝtan ŝakturniron memore al Paul Keres. La turniro komenciĝos la 5-an de junio 2002. Turnirkotizo estas 10 eŭroj. Aliĝoj kaj pliaj informoj ĉe: Arvo Reede (Opetaja 27, Haapsalu, EE-90506, Estonio, <http://www.eyp.ee>, retadreso: [arvo.reede@edela.customs.ee](mailto:arvo.reede@edela.customs.ee)) ĝis la 18-a de majo. [El *Retinfo*]

- **La nova vortaro Baza Esperanta radikaro** de Wouter F. Bilger (recenzita en ĉi tiunumero de *ĜK*, estas ankaŭ senpage akirebla en unikoda versio per la reto, ĉe: <http://www.xs4all.nl/~pilger/breo-au8.htm>

### Pruntado

La sonorilo sonoras. La edzo diras al la edzino:

“Certe estas la najbaro, kiu petos ion prunte. Tio ĝenas min, ĉefe ĉar li neniam redonas la pruntitaĵojn. Ĉi foje mi nenion pruntos.”

Kolere, li malfermas la pordon.

“Bonan matenon!” diras la najbaro. “Mi dezirus scii, ĉu vi posttagmeze bezonas la motorciklon.”

“Certe, ĉar mi devos forvojaĝi kun mia edzino.” respondis la edzo.

“Bonege! Divenite! Trafe! Do, vi lasos hejme la aŭtomobilon. Ĉu vi pruntos ĝin al mi?”

el Bulteno de la Albana Esperanto Instituto  
N-ro 36 [laŭ *Eventoj*]



# La ĉefa jarkunveno de AEA la 10-an de januaro 2002 en Perto

raportas John Gallagher

Ĉeestis 33 personoj:

Paul Green, Bernie Heinze, Penelope Vos, Debra McCarney, Vera Payne, Marcelo Leereveld, Margaret Bambery, Joy Turvey, Helen Baguley, Sandra Connors, Henry Broadbent, Betty Broadbent, Bettie Hart, John Abood, Shirley Gradussov, Colin Giles, Alan Bishop, Sid Wolifson, Dorothy Enderby, Kep Enderby, Trish O'Connor, Ana Wedgwood, Matthew Maguire, Bradley McDonald, Ralph Harry, Owen Loneragan, Franciska Reisel, Niza Kuiterman, Stephen Pitney, Franciska Toubale, Bob Felby, Jennifer Bishop, Hazel Green.

Bonvenigis la prezidanto, Ĵeni Bishop, precipe al Vera Payne, Bradley McDonald kaj Atilio Orellana Rojas, kiuj estis inter la ĉeestantoj.

La kunveno komenciĝis je la 19.08-a horo.

Parolis Ĵeni parolante pri la pasintjara protokolo. Ĝi estis, cetere, disdonita al ĉiuj ĉeestantoj, kiuj povis legi ĝin. Ĝian akcepton proponis Kep Enderby, tion subtenis Marcelo Leereveld.

Bob prezentis la jarraporton de John Gallagher.

Raportis Steve Pitney pri la financaj aferoj.

Sciigis nin Margaret Bambery pri siaj laboregoj por ni en la Libroservo. Informo estas en nova komputilo. Libro katalogo preparatas.

Raportis Marcelo Leereveld pri la ekzamenoj en 2001, kiel ankaŭ pri la stud- kaj gvidlibroj. Li dankis al Ronald Gates. Laŭ li estas malĝojige ke nur tre malmultaj inter ni interesiĝas pri la pli altaj ekzamenoj. Malgraŭ tio ke eĉ li mem kontraŭas al ekzamenoj, li tamen rekomendis al ni,

ke ni faru ĉion por plialtigi la lingvonivelon en Aŭstralio.

Niaj ekzamenoj estas tre altkvalitaj, kaj uzatas eĉ en Vjetnamo, de kie venas D-ro Vinh.

Post tio pri la Korespondkurso Servo parolis Hazel Green. Dianne Lukes uzas nian *The Esperanto Teacher* en Japanujo.

Pri la Koresponda Servo raportis Penny Vos, ke ŝi aperigos en ESK ĉiujn adresojn ricevatajn disde petantoj.

Kep Enderby raportis rakontante pri Publikaj Rilatoj kaj aliaj aferoj, dirante inter alie pri sia ekziĝo kiel prezidanto de U.E.A., pri siaj radio-programoj ktp.

Ankaŭ iu John Belshick pretas kunlabori.

En nekonata vilaĝo, Wongong, iu lernejestro petis ke Kep Enderby prelegu pri Esperanto. Aldonis Kep ke Paul Desailley nun instruas 200 gelnantojn en Ĉinujo.

Parolis Ĵeni Bishop pri ILEI kaj la Cseh-metodo.

Franciska Toubale informis ke tre bonege fartas 3-ZZZ. En la Radioservo kasistas Henry Broadbent. La elsendoj aŭdeblas en Interreto ĉiun lundon inter la 13-a kaj 14-a horo laŭ melburna tempo. Deziras retiriĝi Svetislav Kanaĉki el siaj priradiaj taskoj kaj respondecioj. La Radioservo nuntempe havas 193 kasedojn. Svetislav Kanaĉki deziras trovi lokon por la arkivoj de la elsendoj. Bedaŭrinde baldaŭ la programo ne plu estos elsendita en Sidnejo.

La akcepton de ĉiu raporto proponis Ralph Harry kaj subtenis ĝin Shirley Gradussov.

La kunveno senŝarĝigis la malno-

van estraron laŭ propono de Shirley Gradussov, subtenis tion Bernie Heinze.

Menciis Ĵeni, ke ĉiu membro de la estraro pretas esti reelektita.

Proponis Marcelo Leereveld, kaj subtenis tion Kep Enderby, ke la sekvaj personoj estru AEA-n en 2002:

Prezidanto – Jennifer Bishop.

Vicprezidanto – Hazel Green.

Vicprezidanto – Franciska Toubale.

Kasisto - Stephen Pitney.

Sekretario – John Gallagher.

Helpsekretario – Bob Felby.

Je la 20.35-a horo estis decidite prokrasti la diskutadon ĝis lundo la 14-a de januaro 2002 je la 19-a horo. Kontraŭis unu membro

### **La ĉefa jarkunveno daŭrigata lundon la 14-an de januaro 2002 en Perto de la 19-a ĝis la 20.45:**

Ĉeestis Ĵeni Bishop, Hazel Green, Bob Felby, Stephen Pitney, Marcelo Leereveld, Bernie Heinze, Paul Green, Helena Baguley, Joy Turvey, Shirley Gradussov, Mateo Maguire, Trish O'Connor, Kay Andersen, Alan Bishop, Vera Payne, Penny Vos, Franciska Toubale, Sid Wolifson, Henry Broadbent, Betty Broadbent, Sandra Connors, Debra McCarney, Kep Enderby, John Abood kaj Dorothy Enderby, Bradley McDonald. Ĉeestis la kunvenon ankaŭ Niza Kuiterman, Atilio Rojas kaj Franciska Reisel kiel gastoj.

Ĵeni remalfermis la kunvenon je la 19.10-a horo. Tiam ŝi parolis pri la oficejo en la universitato Monash, kaj ankaŭ pri komputilo, Interreto, adreso, presado, kaj agado en la universito. Kontraŭparolis Bernie Heinze, ke la estraro ne rajtas decidi pagi por tiu oficejo.

Ree diris Ĵeni ke ni ne pagas salajron, sed nur subvencias Margaret Bambery-n, la libroserviston de A.E.A.

Ree raportis Steve Pitney ke ni disponas pri \$10 000 por Informado, Instruado kaj Eksteraj Rilatoj. Ĵeni

Bishop informis ke la estraro pensis pri agoj por la venonta jaro sub tri rubrikoj: Informado, Instruado, kaj Eksteraj Rilatoj kun verŝajnaj buĝetoj de \$4000, \$4000 kaj \$€2000 respektive.

Estis menciite ke pri Informado respondas la gesinjoroj Steve Pitney, John Gallagher kaj Debra McCarney.

Diris Debra ke oni intencas krei afiŝon por reklami Esperanton en Aŭstralio, kiel ankaŭ en Novzelando. Estas intencate uzi ankaŭ la saman broŝuron en ambaŭ landoj. Ili esperas eldoni novajn informfoliojn kaj reklamadi eĉ en la kamparo, kaj, kompreneble, ankaŭ interrete. Kaj io tute nova, post ies morto oni anoncos tion en la loka gazeto en Esperanto por ke la publiko ĝenerala eksciis ke Esperanto uzatas.

Pri instruado parolis Hazel Green. Eblas nun havigi al si tute modernajn lernilojn, sed kompreneble necesas ke oni mem pagu la sendokostojn.

Pri Eksteraj Rilatoj parolis Kep Enderby kaj John Abood.

Plendis tri membroj ke ne estas sufiĉe da tempo en la kunveno por komentoj de membroj.

Proponis Hazel Green ke la estraro klarigu proponitajn projektojn per surmuraj afiŝoj invitante komentojn, aprobon aŭ malaprobbon de la membroj en kunveno vendredon la 18-an de januaro. Tion subtenis Vera Payne. Kontraŭis tion du membroj.

*Somerkursaro en 2003:* La kunveno akceptis, kun danko al E.F.V., la proponon de Kep Enderby, kaj subtenita de Stephen Pitney, ke E.F.V. okazigu la Kursaron en 2003. Voĉdonoj montris ke 9 ĉeestantoj preferas la 4-an ĝis la 19-a de januaro; 6 preferas la 4-an ĝis la 12-a de januaro; 1 preferas la 11-an ĝis la 26-a de januaro; 4 preferas la 11-an ĝis la 19-a de januaro.

Penny Vos instruas en unu el la plej prestiĝaj lernejoj, Montessorio.

Demandis Ĵeni: kiuj volas instrui?

Tiuj kiuj instruis en Perto volas instrui ankaŭ en Viktorio.

Fine Ĵeni donis la respondecon pri la Somerkursaro al Viktorio.

Kep dankis la estraron.

Je la 20.50-a la prezidanto prokrastis la kunvenon ĝis vendredo, por garantii plian vesperan programeron.

**A.E.A.-kunveno daŭrigata vendredon la 18-an de januaro 2002:**

Ĉeestis: Sid Wolifson, Rochelle Jacquier, Paul Green, Penny Vos, John Abood, Shirley Gradussov, Ana Wedgwood, Eileen Jones, Alan Mendelawitz, Henry Broadbent, Betty Broadbent, Debra McCarney, Alan Bishop, Marcelo Leereveld, Bob Felby, Hazel Green, Trish O'Connor. Subskribis voĉdonrajtigilojn por la sekretario: Stephen Pitney, John Harvey, Margaret Bambery, Ralph Harry, Owen Lonergan, Nicholas George, Dorothy Enderby, Keppel Enderby.

La kunveno komenciĝis je la 13.05-a horo.

Pardonpetis la prezidanto nome de

la estraro pro tro rapida fermo de la kunveno en lundo.

Proponis kaj subtenis Marcelo Leereveld kaj Shirley Gradussov, ke la membroj akceptu la peton por pardoni, kaj ke la nuna estraro daŭrigu sian laboron. 19 poris, kontraŭis 0, sindetenis 3.

Proponis kaj subtenis Marcel Leereveld kaj Debra McCarney, ke la membroj akceptu elspezon de \$4000 por la agoj pri informado menciita en la aldonita listo. Poris 21, kontraŭis 0, sindetenis 3.

Proponis Hazel Green kaj subtenis Helena Baguley ke la membroj akceptu la elspezon de \$4000 por la agoj pri instruado menciitaj en la listo aldonita. 22 poris, kontraŭis 0, sindetenis 3.

Proponis John Abood kaj subtenis Sid Wolifson ke la membroj akceptu la elspezon de \$2000 por la agoj pri eksteraj rilatoj menciitaj en la aldonita listo. Poris 20, kontraŭis 0, sindetenis 4. La kunveno finiĝis je la 13.25-a horo.

---

## Raporto de la Korespondkurso servo de AEA de decembro 2000 ĝis decembro 2001 raportas Hazel Green

Dum la jaro studentoj aĉetis 11 korespondajn kursojn de AEA: kvar ekzemplojn de *Bonan Tagon*, kvin de *Jen Nia Mondo*, kaj du de *The Esperanto Teacher*. Kursgvidantoj en Viktorio, Novsudkimrujo kaj Kvinlando helpas studentojn en Vik., NSK, Kv. La Norda Teritorio, kaj Okcidenta Aŭstralio.

La bulteno *Your Esperanto Bulletin* por korespondaj studentoj provizore ĉesis, ĉar la redaktoro (kaj plejparte verkanto) David Poulson translokiĝis al Tajlando.

Por ricevi rapidajn respondojn, kelkaj studentoj sendas ekcerzojn per elektronika poŝto.

Krom per la kvin kursoj de AEA, aŭstralianoj sen klasoj povas lerni per senkosta koresponda kurso, kaj per kelkaj senkostaj interretaj kursoj. John Gallagher havas 6 interretajn studentojn.

Ĉijare la servo donacis 6 ekzemplojn de "The Esperanto Teacher" (nur la lernolibro, ne la tuta kurso) al Diane Lukes kiu volas uzi ilin en Japanujo. □

# Mallonge

• **Poŝ-atlaso:** En novembro 2001 Internacia Asocio MONDA TURISMO (MT) kaj Internacia Studejo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz eldonis *Poŝ-atlason de Monda Turismo*.

Sur 20 koloraj paĝoj (plus kolora kovrilo) la poŝ-atlaso prezentas politikan dividon de la mondo aktualan je la fino de la jaro 2001. Oni notis entute 239 landojn (t.e. suverenajn ŝtatojn kaj dependajn teritoriojn), kiuj estas registritaj de la Internacia Normiga Organizo, ISO kaj havas apartajn simbolojn laŭ ties koncerna normo.

Je la nombro de sendependaj ŝtatoj estas nun ĉirkaŭ 195 (nur “ĉirkaŭ”, ĉar ne ĉiuj ŝtatoj reciproke sin agnoskas).

Aliflanke, se oni aldonus pliajn senhomajn insulojn kaj mikro-ŝtatojn (kiel ekz. Suverena Ordeno de Maltaj Kavaliroj en Romo aŭ Respubliko de Monakoj sur la greka insulo Athos) kaj dividus kelkajn nur formale unuecajn teritoriojn (kiel ekz. Svalbardo kaj Jan-Majeno aŭ Usonaj Minor-Insuloj sur Pacifiko), tiam oni povus noti 270-300 landojn.

Por turistoj certe utila estos la mapo de tempozonoj. La poŝ-atlaso prezentas ankaŭ kontakt-lokojn de MONDA TURISMO en diversaj mondopartoj - kaj la centra mondmapo montras pli ol 130 landojn, al kiuj estas sendataj grupoj de ESPERANTOTUR - TURISMA SERVO DE “MT”. Fakte tiuj ĉi informoj kompletigas la *Turisman Esperanto-Kalendaron 2002*, en kiu troviĝas la adreso.

Fine de la poŝ-atlaso estas indekso de 163 lingvoj registritaj laŭ la internacia normo n-ro 639 de ISO.

Ĝi estas mendebla kontraŭ US\$3 de:

“Monda Turismo” str.M.Skolodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio.

Rete: [turismo@bydgp.pdi.net](mailto:turismo@bydgp.pdi.net)

[El Eventoj] □

• **Mikrogravuraĵo kun portreto de Zamenhof:** S-ino Luo Lan, majstrino de mikrogravurado de Nankino, Jiangsu-provinco, Ĉinio, faris mikrogravuraĵon kun portretoj de 100 famaj kulturaj personoj de la mondo. La 100 portretoj estas sur eburo granda kiel rizgrajno. Sur la malgranda eburo vidiĝas versimilaj portretoj de Zamenhof, Konfuceo, Lusin, Ŝekspiro kaj aliaj.

La gravuraĵo estas rigardenda sub mikroskopo 200-fojon pligrandiga. Luo sinsekve projektis pli ol 500 specojn de novaj Esperanto-mikrogravuraĵoj, kiuj jam ellandiĝis kaj vendiĝis sur la internacia merkato. Multaj el ili estas konservataj de alilandanoj kiel popularaj artaĵoj de Ĉinio.

[El Eventoj] □

• **Naturista vivo** estas tre bone redaktata kaj presata ilustrata (malpornografie) kvaronjara revuo. Abono kostas US\$12, pagebla per UEA-konto inoe-k.

• **3a Azia Kongreso de Esperanto:** Mi recevis el Koreo multajn ekzemplerojn de la unua bulteno de la 3a Azia Kongreso de Esperanto — Seulo 23-26 Aŭgusto 2002. Se individuoj deziras unu aŭ pli, mi volonte sendos. La faldfolio estas interesa kaj informas pri la kongresurbo Seulo.

John Gallagher

Sekretario de

Aŭstralia Esperanto-Asocio.

## Reklamo nepagita

Naskiĝis en Dordonjo (Francio) en la lulilo de la grupo “Esperanto 24” kompaktdisko kies patro Thierry Faverial jam konigis sin al la kongresanoj dum la UK en Montpellier (1998). Tie li montris sian talenton kantante kaj gitarludante dum la spektaklo “la velado” prezentita de LA KOMPANOJ.

Post sia partopreno en komuna bebo, t.e. la KD *Ŝurvoje* de la bordoza grupo LA KOMPANOJ, aperinta en la kolekto 2000 de Vinilkosmo, Thierry Faverial revenas soliste kun *Duone*, en kiu li rolas kiel komponisto, muzikisto, kantisto kaj aŭtoro de kelkaj tekstoj, por prezenti 10 kanzonojn, kies plejgranda parto estas originala.

*Duone* per sia melodia riĉeco miksas la spicajn saporojn de intimeca latinjazo kun la diversaj ritmoj de la eŭropa kanzonaro.

Ĉiu el la titoloj estas invito al vojaĝo, en aparta etoso, kiu kelkfoje kondukas al revemo aŭ dramo, kelkfoje al voluptemo aŭ poezio.

Thierry nun produktas verkon de muzikisto, lasante longajn sonajn periodojn por la ventinstrumentoj, kie la muziknotoj esprimas tion kion la vortoj

ne ĉiam fidele povas diri. Oni mergiĝas en gitara kaj saksofona universo, asociita kun tekstoj ofte esprimplenaj (dankon al la amiko Marcelo Redoulez), foje pli malpezaj, universo el kiu oni ne eliras sen emocio.

Ĝi kostas 15 eŭrojn plus afrankelspezoj.

Esperanto 24, 22b rue Charnay Frachet,  
24000 Perigueux, Francio. □

## Nia konkurso

**Vera Payne** sendis:

ansere, areste, arestos, aserte, entera, penetras, penetro, penetros, pensero, penseto, pentre, pentros, perante, persone, persone, presante, ranpesto, rasp-ero, sapero, senpesta, sentera, sperte, sperto, tenera, tenero, terasa, terena. Ensume, 27 vortoj.

**Gwenda Sutton** sendis la ĉisekvajn aldonajn vortojn:

esperonta, panero, pastre, patose, patrone, perona, perone, persone. penetro, poenta, poente, posteno, pretas, pretos, sateno, senato, soneta, sonete, sperte, sporta, tenora. Ensume, 21 vortoj.



## El la Regionoj



**SA:** *Esperanto en Sudaŭstralio* okazigis la 16-an de decembro, en la nordadelaĵda komunumejo, sian Zamenhof-feston. Je nia granda surprizo, partoprenis iomete pli ol 20 gesamideanoj.

Prezentigis pluraj teatraĵoj kaj kantoj. Ŝajnas ke niaj teatraĵoj sukcesis persvadi almenaŭ unu el la ĉeestantoj lerni Esperanton en la nova jaro!

La plej granda surprizo estis sendube la granda kuko kun portreto de L.L. Zamenhof. Ĉiu el vi rajtas rigardi

la bildon, bedaŭrinde vi ne povas gustumi la kukon!



## Odlo Bokserp: Liaj paĝoj

Kolego kontrabandis al mi la ĉi-sekvan foton de sekreta kunveno de membroj de la Tasmania sekcio de la Tutmonda Pingvena Esperantista Asocio en decembro 2001:



Foto: P. Longvidtulo

La kunveno okazis sekrete, ĉar temis pri la klopodo de la malgranda Tasmania grupo plani puĉon kontraŭ la estraro de TPEA, kiu, laŭ ili, estas dominanta de la Antarktikaj pingvenoj.

Kiel scias niaj legantoj, laŭ la nova Statuto de TPEA la ĉefsidejo<sup>1</sup> de TPEA devas esti neg- aŭ glacidomo; kaj kvankam nur malgranda proporcio de la pingvenoj de la mondo efektive loĝas en Antarktiko, la fifama artikolo 1(2)(b) de la Statuto diras:

“Estraranoj, antaŭ ol esti elektitaj, devas prui ke iliaj prapatroj dum la pasintaj dekdu generacioj estis voĉdonrajtigataj en Antarktiko aŭ iu el ĝiaj kolonioj.”

Kompreneble, ni, la stabo de *ESK*, estas neŭtralaj pri tiaj aferoj, kaj ni nur raportas la faktojn kiel ni vidas ilin. Tamen, estas evidente ke niaj Tasmaniaj kunsimilideanoj rajtas aŭdigi sian proteston, kaj devus ne trovi ke necesas *sekrete* kunveni por diskuti siajn plendojn. Por aŭdi la plendon en ĝia originala sonformo, iru Interrete al: <http://www.esppingven.tas.au/plendo/>

Por aŭskulti ĝin vi bezonos REALCHIRPER®1.3<sup>2</sup> aŭ QUICKCHIRP®5.3<sup>3</sup> (aŭ pli aktualan version) kaj programon kapablan aŭskulti UNIKOD-e.

Subtenmesaĝojn vi povas sendi rekte al la Tasmanipingvenoj, uzante la teksredaktoprogramon PINGVENED, kiu vi povas elŭti ĉe la ĉisupra retadreso kontraŭ pago de 13 fiŝoj.

Intertempe, la Alta Tribunalulo de Aŭstralio akceptis la argumenton de M. Surikato (7j.) (Plena nomo: *Suricata suricatta*) ke, laŭ la leĝo pri egalrajteco, lia peto membriĝi en la Tasmania Pingvena Esperantista Societo estas akceptenda. La Prezidanto de la TPEA deklaris ke li akceptas la decidon, kvankam malvolonte.

S. Surikato migris al Okcidenta Aŭstralio dum li estis junulo, kaj nun havas la prestiĝan postenon de Helpkuratoro de la Zoologia Ĝardeno de Perto. Kvankam korpe surikato, li deklaris al nia raportisto:

“Jam de mia tre frua infaneco mi ĉiam sentis ke mi estas pingveno en la korpo de surikato.” (Vidu foton sur p.30)

Subtenis lin lia patrino, kiu montris al nia raportisto fotojn de S. Surikato antaŭ neĝdomo, “kaj konstrui neĝdomojn,” ŝi diris, “estas malfacile en Suda Afriko”.

Oficiala reprezentanto de Suda Afriko informis nian raportiston ke “Neniu Sud-Afrika leĝo malpermesas ke suritato konstruu neĝdomon, tamen tio estas maloftega”. . □

1. Pli ĝuste: ĉefstarejo.

2. Se vi uzas PC-on.

3. Se vi uzas Macintosh-on.

**LA AŬSTRALIA KAJ LA  
NOV-ZELANDA  
ESPERANTO-ASOCIOJ**

**Aŭstralia Esperanto-Asocio:**

**Prezidanto:** *Jennifer Bishop*, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.

☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH); 📠 03 9905 3668 (BH).

[esperanto@education.monash.edu.au](mailto:esperanto@education.monash.edu.au)

**Vicprezidantoj:**

*Franciska Toubale*, 1 Marne Rd, Mt Evelyn Vic 3796.

[franciska@bigpond.com](mailto:franciska@bigpond.com)

*Hazel Green*, 44 Toowoomba Rd, Oakey Qld 4401.

[hazgreen@tmba.design.net.au](mailto:hazgreen@tmba.design.net.au)

**Sekretario:** *John Gallagher*, 81

Lalla Road, Lillydale Tas 7268.

[abcetc@ozemail.com](mailto:abcetc@ozemail.com)

**Vicsekretario:** *Bob Felby*, 6 Dorset

St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.

[esperantobob@picknowl.com.au](mailto:esperantobob@picknowl.com.au)

**Kasisto:** *Stephen Pitney*, 57 Den-

ham St, Hawthorn Vic 3122.

[Pitney@Cybernetint.net](mailto:pitney@Cybernetint.net)

**Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:**

**Prezidanto:** *Bradley McDonald*,

PO Box 12 103, Auckland 1135.

☎ 09 579 4767, 📠 09 579 1070.

[neelam@voyager.co.nz](mailto:neelam@voyager.co.nz)

**Sekretario:** *Howard Gravatt*, PO

Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035, New Zealand.

☎ 09 626 6129.

[hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz)

**Kasisto:** *Jackie Fox*, Unit 89 Crest-

wood Village, 38 Golf Road, Titirangi Auckland 1007.

☎ 09-826 2081.

[brianandjackie@abztrak.co.nz](mailto:brianandjackie@abztrak.co.nz)

**KOTIZOJ:**

**Aŭstralia Esperanto-Asocio:**

<http://www.esperanto.org.au/>

AU\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

**Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:**

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: *Jackie Fox*, Unit 89 Crestwood Village, 38 Golf Road, Titirangi Auckland 1007.

**Unuopaj ekzempleroj de Esperanto sub la Suda Kruco:**

Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Menu de la Libroservo de AEA.

**Abonoj ekster Aŭstralazio:**

€23,70, pagu al la konto ael-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

**Artikoloj** de aŭtoroj nomitaj estas

© 2002 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ©2002 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac DV SE, la programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per Power Mac 7200, kaj Acrobat.

**Specialaj kunlaborantoj:**

*Odlo Bokserp*, I.N.K, K.R.A.J.O.N, K.R.E.T  
Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisionistoj

*Vera Doloro*, L.M.K.

[lia multsuferranta kontrolanto]

Kaj la multsuferranta kontrolanto de Monash